Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 18 **Kvarmonata** N-ro 2 **apr.-jun. 1988**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

REDAKTA KOMITATO

Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)

Redaktisto: István Ertl, Universitato ELTE, Budapest
Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ 36 1 180 966/185

Presado: Grafika Centro Antverpeno,
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

Balogh V. – *Rilato inter la matematika pensmaniero kaj Esperanto-instruado* . . 1

Golden, B. – *Ĉu ni instruu, ke d-ro Zamenhof estis pola okulisto?* 16

RECENZOJ

Golden B. – *Nova Esperanta lernolibro por hungarlingvanoj* 19

VHZs – *Nuevo método de Esperanto* 27

Ertl I. – *Nouveau cours d'Espéranto* 28

AKTUALAĴOJ

okazintaĵoj – diversaĵoj – informaĵoj – sciindaĵoj 32

RAPORTOJ

– *22a Konferenco de ILEI en Kerkrade* 38

– *23a Konferenco de ILEI en 1989* 40

– *Interesaj laborrenkontiĝoj* 41

– *Nova fakliteraturo en Esperanto* 41

– *Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino* 42

REPREZENTANTOJ

Argentino : Alfredo Juan Valle, Santa Fé 497, RA-1708 Morón (B.A.)
Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Ĉeĥoslovakio : Vêra Barandovská, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Nigerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel

Jarkolekto 18 **apr.-junio 1988** **N-ro 2, 1988**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas trifoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj, eĉ rekomendataj, kune kun fontindiko.

Didaktiko

RILATO INTER LA MATEMATIKA PENSMANIERO KAJ ESPERANTO-INSTRUADO

Balogh V.

Kiam mi lernis matematikon, estis konataj instruataj temaroj de matematiko nur: *aritmetiko, algebro, geometrio, analizo.* Tiuj estas ankoraŭ nur la *bazoj de matematiko* — la klasikaj partoj!

Sed nun jam tre larĝa estas la studmaterialo de matematiko, ĉar intervenis modernaj temaroj, kiuj formas ĉefe la pensmanieron de la gelernantoj el la *praktika vivo,* al *ĉiutagaj problemoj* kaj al la matematikaj konoj. Tiuj ĉi modernaj temaroj estas:

- aroj
- grafoj
- matematika logiko
- probablec-kalkulo
- procezfiguroj
- kombinatoriko
- relacioj, interrilatoj
- matematika statistiko
- topologio
- lud-teorio

kaj tiel plu.

Ĉar Esperanto havas logikan konstruon en sia gramatiko, mi inspiriĝis apliki la matematikan pensmanieron en instruado de lingvo: "Se la gelernantoj konas tiujn matematikajn sciojn, *kial ne uzi tiujn en nia tasko, en la lingvoinstruado*? Mi trovis multfoje aplikitaj en lernolibroj de D-ro SZERDAHELYI similajn metodojn!

Nun mi provas montri kelkajn ekzemplojn por tia aplikado.

1. Aroj


Ar-teorio estas memstara, sendependa branĉo de matematiko. Ĝi okupiĝas pri elementoj, kiuj povas esti konceptoj, aĵoj kaj ĉio, kio ĉirkaŭas nin. La matematikistoj kolektas en arojn elementojn kun la sama(j) eco(j).

1.1. Substantivoj en aroj

Tiujn arojn ni povas uzi en *vortolernado, sistematika vortkolektado,* kaj en *vastigo de la vorttrezoro.* Dum la enkondukaj studhoroj, kiam mi donas nur la plej gravajn gramatikaĵojn, ni kolektas la vortojn laŭ aroj.

La matematikistoj — por vidigi — skribas la elementojn de aroj en diagramojn, t.e. en fermitajn, kurb-liniajn enaĵojn. (Fig. 1)

Fig. 1



1.1.1. Mi tuj instruas *la kolektivajn vortojn*!

a) ĉar per kolektivaj vortoj eblas *komenci dialogon*: "Kiuj personoj sidas en la ĉambro?", "Kiuj mebloj estas en la loĝejo", ktp.

b) ankaŭ en reala konversacio gravaj estas la kolektivaj vortoj, se la parolanto ne scipovas ankoraŭ flue paroli: "Mi forgesis la nomon de tiu besto", "Bonvolu diri al mi la nomon de tiu arbo", "Ĉu vi scias Esperante la nomon de tiu objekto?"

1.1.2. Vortoj skribitaj en arojn ne bezonas la apudskribon de gepatralingvaj vortoj, ĉar kelkaj jam estas konataj pro internacieco aŭ simileco al gepatralingvaj vortoj, kaj la vortoj estas kolektitaj logike. Tiel la gelernantoj, per elektada metodo, *konkludas* pri la signifo de vortoj!


1.1.3. La gelernantoj ĉiam havas le eblon memvole kolekti novajn vortojn, kiuj apartenas al la preparitaj aroj. La aroj helpas la *memlernadon de la vortoj.* El vortaro ili mem kolektas vortojn, ĉar ili interesiĝas pri tiuj.

1.1.4. La plej gravajn vortojn tiel ni *rapide ekkonas,* poste la gelernantoj eklernas. Jam dum la unua studhoro ni kolektas vortojn ĉirkaŭ dek arojn: *objektoj, mebloj, bestoj, floroj, fruktoj, personoj, profesioj, nomoj.*

Al miaj gestudentoj mi konatigas ankoraŭ la *studobjektojn* kaj la *titolojn* de altlernejaj instruistoj, ĉar ĉiuj tiuj estas konataj vortoj kaj la studentoj ekvidas, ke la internaciaj vortoj apartenas al la Esperanto-vortaro.

Mi montras multajn tiajn vortojn, ĉar mi observis, ke komencantajn lingvolernantojn interesas unue la vortoj konataj el aliaj lingvoj! (Fig. 2)

Fig. 2



1.1.5. Ni tuj aplikas la lernitajn vortojn en frazmodeloj:

a) *Kio estas la ĉevalo? La ĉevalo estas besto.*
Kio estas la . . . . . o? La . . . . . o estas . . . . . .o.

b) *Kio estas la gazeto kaj ĵurnalo?*
La gazeto kaj ĵurnalo estas objektoj. Ili estas objektoj.
(Konvenas tuj instrui la personajn pronomojn!)

c) *Ni aplikas la vortojn ankaŭ en inversa formo*: per bildoj aŭ per desegnaĵoj mi montras konkretajn elementojn (rozon, hundon, seĝon, ktp.) kaj mi demandas per kolektivaj vortoj:
Kiu floro estas ĝi? Kiuj bestoj estas ili?
Ĝi estas rozo. Ili estas hundo kaj kato.
Kiu . . . . o estas ĝi? Kiuj . . . . oj estas ili?
Ĝi estas . . . . o. Ili estas . . . . oj.


1.1.6. Sen problemo ni uzas *kio?*- kaj *kiu(j)*-demandojn.

— *KIO* se ni interesiĝas pri la nomo de aro, pri kolektivaj vortoj;

— *KIU(J)* se ni interesiĝas pri la konkreto, pri la nomoj de la elementoj en la aroj.

1.1.7. La *gramatikaĵojn* intertempe mi konatigas, montrante ilin ankaŭ per aroj, ekzemple *-ino* kaj *-isto*. (Fig. 3)

Fig. 3



1.1.8. Ni pensu inverse! El kiuj vortoj ni preparis la profesiajn vortojn? — *poŝto, muziko, kanto, ĵurnalo, verko, instruo, tekniko, laboro, ofico, arto...*

1.1.9. Ni praktikas per frazmodeloj la lernitajn vortojn, per helpo de aroj:


a) *Kio estas Johano? — Johano estas fraŭlo*
Johano estas poŝtisto
Kio estas Katarina Kovács? — Katarina Kovacs estas kantistino.
Kio estas . . . . . (nomo)?
. . . . . (nomo) estas . . . . . .o.

b) *Kiu estas . . . . . ? — (Vi, li, ŝi, ili)*
. . . . . estas . . . . . (nomo/j/).

c) Aŭ el profesioj, aŭ el personoj de aroj ni elektas vortojn:
Kiu estas la muzikisto? — La muzikisto estas Jozefo Dinnyés.
Kiu estas la . . . . . ? — La . . . . . estas . . . . . (nomo).
En tiuj ĉi frazoj povas manki "la" difina artikolo!

"Instruistoj de altlernejo": *rektoro, dekano, ĉefdirektoro, vicdirektoroj, kandidatoj, doktoroj, docentoj, adjunktoj, asistantoj,* ktp.
"Studobjektoj": *filozofio, pedagogio, analizo, algebro, geometrio, historio, lingvistiko, literaturo, geografio, biologio, kemio, fiziko, gimnastiko, tekniko, kanto, muziko,* ktp.

Fig. 4



La gelernantoj povas tiel orientiĝi inter la lernitaj vortoj kaj formi jam malgrandajn frazojn.

Dum la enkondukaj studhoroj ni ne uzas lernolibron; la gelernantoj skribas la vortojn en kajeron, same la frazmodelojn kaj la konkretajn gramatikaĵojn. Dum la postaj studhoroj, kiam ni jam lernas laŭ iu lernolibro, mi donas hejmtaske kolekti vortojn el vortaro laŭ aroj, ekzemple: *arboj, vestaĵoj, veturiloj, partoj de korpo*, ktp.

La legaĵoj donas inspiron al vortlernado, sed por eklerni vortojn nur laŭ ili, oni bezonas tre longan tempon, kaj mi spertis, ke tio ne donas sistemon por vastigi la vorttrezoron. Pro tio, dum la tuta lingvoinstruado, mi atente sciigas ilin pri la sistema vortkolekto.

1.2. Adjektivoj, verboj, aliaj vortspecoj en aroj

1.2.1. Adjektivojn al *kia(j)*-demandoj mi disigas dum la dua enkonduka leciono al tri partoj: *koloroj, nacioj, ceteraj ecoj.*

La kolektadon oni povas fari ankaŭ en tabela formo! (Fig. 5) Mi donas multajn vortojn, ĉar mi spertis, ke ĉiuj gardis en sia kapo ĉirkaŭ 50% de la vortoj.

	KIA?	KIAJ?	
Koloroj	Nacioj	Ceteraj	ecoj
ruĝa(j)	hungara(j)	bona(j)	nova(j)
blanka	bulgara	bela	freŝa
verda	soveta	kara	granda
nigra	pola	ĉarma	alta
bruna	slovaka	facila	larĝa
flava	germana	forta	longa
griza	itala	acida	hela

En frazmodelojn ni tuj aplikas kaj praktikas la vortojn kune kun la lernitaj substantivoj:

a) *Kia estas la sinjoro? — La sinjoro estas eleganta.*
Kia estas la . . . . . .o? — La . . . . . .o estas . . . . . .a

b) *Kiaj estas la . . . . . .oj? — La . . . . . .oj estas . . . . . .aj.*

c) *Kia estas la . . . . . .a . . . . . .o?*
La . . . . . .a . . . . . .o estas . . . . . .a.

1.2.2. El verboj ni faras arojn dum la tria enkonduka studhoro: laŭ la deziro ni kolektas vortojn. (Fig. 6)

Fig. 6




Laŭ la vortkolektaĵo — sen la demandoj "Kion faras"! — ni diras mallongajn frazojn:

La instruisto instruas. — La kato atentas.
La teknikisto laboras. — La hundo salutas.
La muzikisto amuzas. — La knabino demandas.
Johano muzikas. — Helena rigardas.
ktp.

1.2.2.1. Per bildoj aŭ per desegnaĵoj mi montras tiujn, kiuj faras ion, aŭ nur la nomon de la subjekto. Okazas konata kaj tipa eraro, laŭ la antaŭaj ekzercoj: "Kio *estas* la kato" — "La kato *estas* besto". Se oni poste demandas "Kion *faras* la kato?", ili ankaŭ nun respondas "La kato *faras* ..."
Pro tio mi praktikas la verbojn sen demandoj. Al demando sur la tabulo "Kion faras...?" kolektu respondojn laŭ la frazmodelo "La . . . . . o . . . . . as".
(Mi ne forgesas uzi ankaŭ la personajn pronomojn: "Mi laboras", "Ili kantas", ktp.

1.2.2.2. Ni kolektas adekvatajn verbojn al iu subjekto: "Kion faras *la lernanto, la ĵurnalisto, la poŝtisto, la virino, la tigro, la kato, la kokino*?" ktp.

Fig. 7




Tio donas ritmon en la parolpraktiko, ĉar al unu demando la lernantoj konas plurajn respondojn:

La lernanto lernas. — La kato staras.
La lernanto silentas, ktp. — *La kato manĝas,* ktp.

1.2.2.3. Kiam ni jam deziras paroli elekteme, tiam ni kolektas verbojn pri movo; pri parolo; pri vojaĝo; pri la scio, ktp. La *parencajn vortojn* ni kolektas en arojn:


Fig. 8



Pri bildoj, aŭ per vortoj elektitaj el la aroj, la lernantoj formas mallongajn frazojn: *La poŝtisto venas, La ĉarma knabino promenas,* ktp. — *La instruisto prelegas, La virino babilas,* ktp.

1.2.3. Objektojn ni kolektas al verboj; ekzemple:
Kion oni legas, skribas, lernas, diras, desegnas, kantas, ktp.

Fig. 9



Per vortoj el tiuj ni praktikas denove frazmodelojn al demandoj:

Kion manĝas la . . . . . o? — La . . . . . o manĝas . . . . . on.

Kion . . . . . as la . . . . . o? — La . . . . . o . . . . . as . . . . . on.


Eĉ kun epitetoj kiaj:

La knabo trinkas freŝan akvon. Karlo desegnas grandajn domojn.

1.2.4. Ĉi tie mi trovis lokon elformi konojn pri verboj kun infinitivoj; ekzemple:

Kion vi ŝatas manĝi?
Kion vi deziras trinki?
Kion vi volas legi?
Kion vi devas lerni?

Fig. 10



Same en frazmodeloj:

Kion vi volas? — Mi volas ludi!
Kion vi . . . . . as? — Mi . . . . . as . . . . . i.
Mi . . . . . as . . . . . i . . . . . on.
Kion vi preferas? — Mi preferas legi ol ludi.
— Mi preferas kafon al teo.


1.2.5. Eblas kolekti en arojn samtemajn vortojn; ekzemple pri monatoj, tagoj de la semajno — tio helpas la memoradon!

1.3. Prepozicioj en aroj

Ankaŭ la 33 prepoziciojn mi instruas komune, kolektite laŭ demandoj. Ekzemple: al *kie?* apartenas 15 prepozicioj. Tio pli helpas en la kompreno kaj memorado ol simpla laŭalfabeta prezento de la prepozicioj.

1.3.1. Mi montras desegnon pri la aro de prepozicioj, kiuj apartenas al la demando *"Kie?"*. La enkondukon de tiuj 15 prepozicioj sekvas longa ekzercado en diversaj formoj!

Fig. 11



a) *Kie estas la ŝranko? — La ŝranko estas ĉe la muro.*
kie estas ni? — Ni estas en la klubejo.

b) *Kie vi sidas? — Mi sidas apud Maria,*
ĉe la tablo,
inter du fraŭlinoj,
malantaŭ Johano,
sub la lampo, ktp.

c) *Sur kio estas la ĵurnalo? — Ĝi estas sur la tablo.*
Antaŭ kiu mi staras? — Vi staras antaŭ Katarina.

d) *Kio kondukas tra la urbo? — Tra la urbo kondukas la ŝoseo.*
Kio estas kontraŭ la kulturdomo? — Kontraŭ ĝi estas la hospitalo.

1.3.2. Saman afiŝon mi preparis por *"Kien?"*-demandoj. Ni forlasas tri prepoziciojn (*ĉe, tra, preter*) kaj anstataŭ venas novaj kvin prepozicioj:

al | de | ĝis | for | el

N-finaĵon ricevos la vortoj, kiuj apartenas al la restintaj 12 prepozicioj, sed ne estas tiel ĉe la novaj prepozicioj: *"Kien vi iras?"*


Mi iras en la ĉambron. — Mi iras sur la monton.
Mi iras al mia amiko. — Mi iras ĝis la placo.

Multflanke ni ekzercas la demandojn *"Ĝis kie?"* kaj *"De kie?"*:

El kiu . . . . . ? aŭ *Kien vi sendas la leteron?*
— Al kiu vi sendas ĝin?

1.3.3. La sekva desegnaĵo montras 8 prepoziciojn, kiuj aperas kun *"Kiu?"* kaj *"Kio?"*.

Fig. 12



Dum la ekzercado la gelernantoj observas, ke ĉiuj prepozicioj kunmeteblas kaj kun *"Kiu?"* kaj kun *"Kio?"*. Demandoj:

Pri kiu vi parolas? Pri kio vi parolas?
Kun kio vi venis? — Mi venis kun mia teko.
Per kio vi venis? — Mi venis per aŭtobuso.
Sen kiu vi venis? — Sen mia amiko.
Sen kio vi venis? — Sen mia libro.


1.3.4. Mi preparis desegnaĵojn, afiŝon, ankaŭ al sekvaj demandoj: Al *"Kiam?"*-demando apartenas prepozicioj el la konataj (*en, antaŭ, de, ĝis*) sed venas tri novaj, ekzemple:

je | post | dum

Sed la demandoj de tipo *"de kiam?* kaj *"ĝis kiam?"* bezonas aliajn kunmetitajn prepoziciojn: *ekde, de post, ĝis antaŭ,* ktp.
Al *"Kial?"*-demando apartenas novaj prepozicioj: por kaj pro
Al *"Kiom?"*-demandoj apartenas nova prepozicio: po

1.3.5. Samajn tabelojn aŭ afiŝojn oni povus prepari pri 12 prefiksoj kaj 35 sufiksoj, pri konjunkcioj, pri *-aŭ*-finaĵaj adverboj kaj pri aliaj aroj de vortoj.
(Tio okazas en kvintaga superintensa kurso, nomata ankaŭ "pirata metodo". Ties lernantoj daŭre havas antaŭ la okuloj la tutan surafiŝigitan gramatikon de Esperanto. — La red.)
La matematikistoj ne nur kolektas la konceptojn kaj aĵojn en arojn, sed ili faras operaciojn per aroj!
Inter du aŭ pli da aroj oni formas la sekvajn operaciojn:

Fig. 13




a) formado de parto(j)
b) formado de komunaĵo
c) formado de unio
d) formado de diferenco

La strekitaj partoj montras la operaciojn inter A- kaj B-aroj.

1.4 Kion helpas la operacioj el vidpunkto de lingvoinstruado?

1.4.1. La partoj de aroj specialigas la konceptojn kaj aĵojn. Per tiu ni helpas la vortdifinon kaj vortklarigon.


Fig. 14



Kio estas la seĝo? — La seĝo estas meblo, loĝeja meblo, sidloko... Sur ĝi sidas personoj. Ĝi staras sur la planko almenaŭ per tri, sed ĝenerale per kvar piedoj, ktp.

1.4.2. La komunaĵo, la sekva operacio, pli precizigas la difinon. Pli multajn ecojn ni povas diri pri la elementoj, ekzemple:

Fig. 15



Kio estas kokino? — Kokino estas ano kaj de birdoj, kaj de dombestoj. Pro tio ni difinas tiel: *"La kokino estas birdo kaj dombesto." — "Kaj"*-vorto karakterizas la komunaĵon de aroj!

1.4.3. Al unio apartenas ĉiuj elementoj — en la unio de ĉi-supraj aroj estas birdoj aŭ dombestoj. *"Aŭ"*-vorto karakterizas la union de aroj!

SUME: Per helpo de aroj ni povas kolekti la vortojn kaj sisteme vastigi la vortscion de la gelernantoj; eĉ ili mem povas larĝigi sian vorttrezoron per vortaro. Per operacioj de aroj ni povas doni vidpunktojn al vortdifinoj kaj ni specialigas la vortojn, konceptojn.

(daŭrigota)

Zamenhof

ĈU NI INSTRUU, KE D-RO ZAMENHOF ESTIS POLA KURACISTO?

Bernard Golden

En 1987 *Eŭropa*-eldonejo en Budapeŝto publikigis unu el la atutaj libroj de la Jubilea Jaro de Esperanto. Temas pri *Utam a Világban* (Mia Vojo en la Mondo),* antologio de Esperanta prozo kaj poezio tradukita en la hungaran lingvon. La verko ankaŭ informas pri Esperanto kaj ĝia literaturo sed, bedaŭrinde, misinformas pri d-ro Zamenhof. Sur unu el la klapoj de la ŝirmkovrilo estas skribite, ke la aŭtoro de Esperanto estis pola okulisto en Varsovio. Nu, ĉu Zamenhof vere estis pola okulisto? La demando havas du partojn kaj du malsamajn respondojn. Okulisto? Jes! — Pola? Ne!

Pri la profesio de Zamenhof ne ekzistas eĉ ombro da dubo. Jam estis publikigitaj transskriboj de kurs-titoloj kaj notoj de la medicina fakultato de la Universitato de Moskvo, kaj ekzistas fotografaĵo de la kuracista diplomo, kiun Zamenhof ricevis de la Universitato de Varsovio en 1885. Estas sciate, ankaŭ, ke li specialistiĝis pri okulmedicino en varsovia hospitalo kaj vienaj klinikoj, antaŭ ol komenci sian okulistan praktikadon en Varsovio fine de 1886.

Nun venas la tikla punkto. Ĉu eblas dokumenti la apartenecon de Zamenhof al la pola gento? Kial tiom da aŭtoroj insistas pri lia poleco? Ni ekzamenu unue kelkajn lernolibrojn eldonitajn en Hungario. En 1959 aperis la unua eldono de *Eszperantó Nyelvkönyv* (Esperanto-gramatiklibro), kies aŭtoro, la konata Julio BAGHY priskribas Zamenhof kiel "la juna pola okulisto el Varsovio". Tiun karakterizon eĥas

* Tamen kun la Esperanta titolo "Mi vizitis nian farmon" — (La red.)

s-ino Béla HEGEDÜS, la aŭtoro de *Eszperantó Szakpróba* (1973), manlibro por la lernado de Esperanto fare de membroj de la pionira movado; la respondo al la demando "Kiu estis Zamenhof?" estas "pola kuracisto". La samaj vortoj estas ripetitaj en 1979, kiam estis publikigita *30 nap alatt eszperantóul* (Esperanton en 30 tagoj) de Jozefo HORVÁTH; li skribas, ke Esperanto estis, jen "juna pola studento", jen "okulisto el Varsovio".

Efektive, ne ĉiuj priskriboj en lerniloj identigas Zamenhof kiel polon — *se* la verkinto degnas diri ion pri la deveno de la aŭtoro de Esperanto. Ekzemplo de tiu ĉi manko troviĝas en la gramatiklibro *Eszperantó Nyelvkönyv* (1984) de Oszkár PRINCZ, kiu informas nur, ke Zamenhof naskiĝis en "Bialystok (Bjalistoko)". Rimarku, ke malgraŭ cito de du formoj de la urbnomo, ne estas menciita la lando. Kvankam d-ro István SZERDAHELYI en siaj didaktitaj verkoj ne nomas Zamenhof polo, li ja reliefigas, ke li naskiĝis en pola urbo. La frazero "la pola urb(et)o Bjalistoko" troviĝas en la unua volumo de lia gramatiklibro por gejunuloj, *Eszperantó Nyelvkönyv* (1965), en la inicadkaj ekzerclibro por universitataj studentoj, *Eszperantó – Bevezetés és Nyelvgyakorlatok* (1976), kaj en lia lasta lernilo, *Kevés szóval Eszperantóul* (En Esperanton per malmultaj vortoj – 1987). En aliaj verkoj aldoniĝas jena detalo pri la politika situacio en Bjalistoko en 1859. Laŭ *Gvidlibro por Supera Ekzameno* (1966) Zamenhof naskiĝis "en la pola urbeto Bialystok, apartenanta tiutempe al cara Rusio". Kun malgranda variaĵo, la sama frazo aperas en la dua volumo de la junulara lernolibro de SZERDAHELYI, *Eszperantó Nyelvkönyv* (1968): "la pola urbo Bjalistoko, apartenanta tiutempe al Rusa Cara Imperio".

Tamen, ankoraŭ mankas tre grava informo pri Zamenhof, kiu estis sisteme kaj intence prisilentata ĝis nun — laŭ mia scio — en ĉiuj Esperanto-lerniloj eldonitaj en Hungario. Ni rigardu kiel Zamenhof estas prezentita en la internacia Esperanto-kurso por geknaboj, *En Novan Mondon* (1982), verkita de Vilma Sindona EICHHOLZ. En la 5-a Teksto-Kajero (pĝ. 288-290) troviĝas jenaj faktoj:

Lazaro Zamenhof naskiĝis ... en Bielostok, Rusujo ... Li sendube estis Rusa civitano.

En 1791 la caro permesis al en Rusujo persekutataj Judoj ekloĝi en Bjelostoko.

Kiam Zamenhof naskiĝis, formis tie la Judoj, ankaŭ nomitaj Hebreoj, la plimulton kun 66%.

... la Judoj, al kiuj Zamenhof apartenis, parolis inter si la Jidan.

... en kelkaj libroj oni nomas d-ron Zamenhof Polo. Sed tio estas malĝusta.

Estas evidente, do, ke d-ro Zamenhof naskiĝis judo (fotografaĵo de la originala naskiĝatesto pruvas tion). La plej konvinka negado de poleco venas de Zamenhof mem. En letero, sendita al la Loka Kongresa Komitato en Krakovo la 14-an de februaro 1912, Zamenhof skribis: "... ne nomu min 'polo' por ke oni ne diru, ke mi — por akcepti honorojn — metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas ... laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento *hebrea*."

Kial, do, oni senĉese insistas, ke Zamenhof estis polo? Mi ne povas trovi alian kialon ol tiun ĉi: ĝi estas artifiko por kaŝi la veron, por prisilenti lian judecon. Ne temas pri imagita aŭ hazarda agado. En la Enkonduko de *La Kaŝita Vivo de Zamenhof* de N.Z. MAIMON, Prof. WARINGHIEN tuŝas ĝuste tiun demandon, menciante ekzemplojn de cenzurado de faktoj pri la genta origino de Zamenhof en publikigaĵoj, ekzemple la *Enciklopedio de Esperanto.* Antaŭ nelonge mi ricevis leteron de la redaktoro de Esperanto-revuo de landa organizaĵo, kiu informis min, ke li *intence* ne parolas pri "la juda okulkuracisto" aŭ "la juddevena aŭtoro de Esperanto", kaj kial li instruas Esperanton, li tute forlasas la fakton, ke Zamenhof naskiĝis judo.

Bonŝance kaj saĝe Zamenhof inkludis en sia *Proverbaro* jenan diraĵon: "Eĉ el sub la tero aperas la vero". Nerefutebla, do, estas la konkludo, ke Zamenhof estis juda, ne pola, okulisto.

Recenzoj

NOVA ESPERANTO-LERNOLIBRO POR HUNGARLINGVANOJ

Bernard Golden

1. Enkonduko

En 1987, la jaro de la jarcenta jubileo de Esperanto, aperis en Hungario nova Esperanto-lernolibro:

> Dr. István SZERDAHELYI. – *Kevés szóval eszperantóul. Esperanto simpla kaj praktiko.* – Budapest: Tankönyvkiadó: 1987. – 167 p. 20cm. – Prezo: 24 forintoj en Hungario. – Eldonkvanto: 11 500.

Tiu ĉi verko, kies titolo signifas "(En) Esperanton per malmultaj vortoj", estis preparita laŭ dekreto de la hungara Ministro pri Kulturo kaj publikigita de la ŝtata lernolibra eldonejo. Ĝi apartenas al serio de samformataj kaj samcelaj lingvolerniloj.

En antaŭe verkita artikolo[1] mi kritike ekzamenis du recenzojn pri Esperanto-lernolibro en la itala lingvo[2] kaj prezentis miajn vidpunktojn pri la maniero taksi la celon kaj enhavon de tiuspeca didaktika verko. En tiu ĉi eseo mi deziras apliki la saman analizan metodon.

2. Celo de la lernolibro

En la antaŭparolo, d-ro SZERDAHELYI informas, ke la libro estas destinita primare por tiuj, kiuj jam lernis Esperanton, eble en elementa kurso, kaj volas sisteme praktiki, utiligi kaj kompletigi sian scion de la lernita materialo. La libro povas servi ankaŭ al tiuj, kiuj komencas lerni Esperanto per ĝi. Tiun ĉi celon plenumas la unua,

enkonduka, parto. Cetere, la lernilo konvenas ne nur por aŭtodidakta lernado sed povas esti uzata ankaŭ en lingvokurso.

Estas klarigite, ke la tempo por alproprigo de la enhavo diferencas laŭ la nivelo de la lernantoj: (1) komencantoj, kiuj uzas la lernilon tuj post la unua kurso, (2) personoj, kiuj antaŭ longe lernis Esperanton kaj nun volas renovigi siajn mankantajn sciojn, kaj (3) komencantoj sen antaŭa scio de la lingvo. Nenio estas dirita pri la aĝ-grupoj de lernantoj, ilia eduk-nivelo kaj iliaj motivoj por lerni Esperanton, kvankam tiuj faktoroj ludas tre gravan rolon en la enhavo de lernilo kaj la preparado de kursmaterialoj.

3. Aranĝo de la enhavo de la lernolibro

Ĉar temas esence pri du specoj de lernantoj, komencantoj kaj progresantoj, *Kevés szóval eszperantóul* estas dividita en du preskaŭ egalajn partojn. La "Enkonduko" konsistas el tri longaj sekcioj, ĉiu multe pli longa ol kutimaj lecionoj, en kiuj estas prezentitaj la rudimentoj de la gramatiko de Esperanto kaj la baza vortprovizo. La sekva, ĉefa, parto enhavas dek lecionojn (jen ankoraŭfoje la magia nombro de dek lecionoj!). Ĉiu leciono estas pli-malpli egale longa kaj havas la saman strukturon kun jenaj eroj: (1) laŭtema legaĵo unu paĝon longa, ilustrita per desegnaĵo, kiun sekvas tekstklarigoj en la hungara lingvo; (2) paroltrejnado; (3) ambaŭdirektaj tradukekzercoj; (4) alispecaj legaĵoj kiel anekdotoj, ŝercoj kaj poemetoj; (5) taskoj por ekzerci sin pri diversaj gramatikaĵoj. Ĉe la fino de la libro estas ŝlosilo (solvoj) de kelkaj taskoj. La lasta parto de la "Enkonduko" estas kontrola testo, kiu havas ŝlosilon, sed la kursfina testo en la dua parto ne havas respondojn, do la lerninto mem ne havas eblon mezuri la gradon de sia alproprigo de la lingvo. Tiu manko neniel estas pravigebla laŭ pedagogia vidpunkto en lernilo servanta por aŭtodidakta lernado.

Malegalaj estas la spaco kaj emfazo dediĉitaj al diversaj specoj de lernotaĵoj. En la "Enkonduko" estas reliefigita la ĝusta prononco de Esperanto en komparo kun la fonetiko de la hungara lingvo. Troviĝas

informo, ke magnetofona kasedo estas havebla, sed mankas detala priskribo pri ĝi.[I] La aŭtoro klarigas, ke alproprigo de la fundamenta gramatiko de Esperanto estas relative pli facila ol tiu de etnolingvoj; sekve de tio, la lernolibro postulas pli da penado kaj tempo por lernado de vortoj kaj la principoj de vortfarado. Pro tio la ekzercoj havas plejparte leksikan karakteron.

4. Vortprovizo

La prezento de la lernota vortprovizo estas komplika, eĉ kaosa. Plej verŝajne iu metodologia principo determinanta la amplekson de la leksika materialo limigas la nombron de morfemoj uzataj, same kiel okazas en la t.n. Zagreba metodo. Tamen, en la legaĵoj kaj ekzercoj novaj vortoj ofte aperas. Tiuj vortoj estas uzataj nur unu fojon kaj ne ripetataj aliloke en la libro.

Klarigoj pri la vortoj rigardataj kiel plej bezonataj sekvas la legaĵon ĉe la komenco de ĉiu leciono. Se mankas iu vorto en la listoj, tio signifas, ke (1) ĝi jam estis uzata en la "Enkonduko" kaj troviĝas en la Esperanto-hungara vortareto ĉe la fino de la libro, aŭ (2) ĝi apartenas al la t.n. pasive konata vortprovizo, listigita en aparta sekcio post la vortareto. Krome, kelkaj legaĵoj havas vortojn signitajn per steleto; ankaŭ ili estas pasive sciendaj vortoj. La aŭtoro emfazas, ke ne estas superflua vorto en la libro, nur pli kaj malpli ofte uzataj vortoj, kaj en certa situacio iu ajn el ili povas esti bezonata. La baza koncepto estas: ju pli da vortoj oni scias, des pli oni povas esprimi sin en la lingvo.

Nenie en la libro troviĝas klarigo pri la principo de selektado de vortoj por la du kategorioj, la aktiva kaj la pasiva. Ne estas facile kompreni, kial vortoj kiel "flanko, nenio, nombri" kaj "plezuro" apartenas al la dua kategorio, dum "apetito, honti, napo" kaj "ŝalti" estas etikeditaj kiel pli oftaj.[II].

Malfaciligas la uzon de tiu ĉi lernolibro la manko de unuecigita Esperanto-hungara vortareto. La vortoj en la aktiva listo havas apude la hungaran tradukon, sed en la pasiva listo estas nur la Esperantaj

vortoj laŭ alfabeta ordo. Akompanas kelkajn el ili la numero de la leciono, en kiu ili estas uzataj; tiuj ne havantaj numeron, troviĝas ie en la "Enkonduko". Tio signifas, ke uzantoj de la lernilo devas konstante transturni plurajn paĝojn por serĉi la lokojn, kie la Esperantaj vortoj estas klarigitaj. Tiu resendado okazigas disipadon de tempo kaj, sekve, malkuraĝigon por plua lernado. Estas ankoraŭ unu komplikaĵo: ĉe kelkaj legaĵoj, la traduko de nove enkondukitaj vortoj troviĝas en la marĝeno de la peco aŭ kiel piednoto sur la paĝo. Sporadaj tradukoj aperas ankaŭ interkrampe en tekstoj. Ankoraŭ unu difekto laŭ leksika vidpunkto estas la manko de hungara-Esperanta vortareto por plenumi la hungarlingvajn traduk-taskojn.

Ne estas kompreneble, kial la vortprovizo estis aranĝita en tiel nepraktika maniero. Nemalhavebla parto de bona lingva lernolibro estas dudirekta vortareto enhavanta ĉiujn vortojn uzatajn en la libro kune kun tradukoj kaj aliaj klarigoj. Se aŭtoro opinias, ke necesas diferencigi vortojn, kiuj estas aktive lernendaj, disde tiuj, kiuj konvenas por nur pasiva rekonado, li povas signi ilin per steletoj aŭ aliaj simboloj.

5. Pritakso de la legaĵoj

La ĉefaj legaĵoj apartenas al la dek lecionoj de la dua parto de la lernilo. Tiuj de la unuaj kvar lecionoj rakontas pri renkontiĝo inter hungara junulo kaj junulo el Vieno, kiam tiu ĉi venas viziti en Budapeŝto. En la sekvaj tri lecionoj la temoj varias: "Ĉe doktoro", "En aŭtobuso" kaj "Sur la strato". En lecionoj ok kaj naŭ estas fantazia rakonto pri nigra hungaro. La peco de la deka leciono temas pri universala Esperanto-kongreso. Krom la supremenciitaj tekstoj, dise tra la libro troviĝas mallongaj amuzaj legaĵoj kaj poemoj, kelkaj el kiuj, kiel "Akvomelono" (p. 32) kaj "Heliketo, heliket'" (p. 89) pli konvenas por instrui Esperanton al infanetoj ol al plenkreskuloj!

6. Kritika juĝado de la lernolibro

Antaŭ publikigo, la manuskripto de *Kevés szó eszperantóul* estis kritike legite por la eldonejo fare de tri instruistoj, ĉiuj hungaroj. Plej verŝajne pro tio ne estis elsarkitaj kelkaj frazoj enhavantaj hungarismojn. Cetere, makulas tekstojn el la lernolibro semantikaj eraroj kaj stilaj malglataĵoj. La juĝintoj de la verko preteratentis ankaŭ kelkajn misaĵojn en la organizado de la lernota materialo. Efektive, ne eblas ekscii, kiu sistemo aŭ principo gvidis la prezentadon de gramatikaĵoj. Ekzemple, sur paĝo 137 troviĝas la sigloj FRG, GDR, UEA, TEJO, ILEI kaj LKK. La lernanto ne kapablas legi tiujn siglojn, ĉar, kvankam la Esperanta alfabeto aperas jam sur p. 29, ne estas iu indiko pri la prononco de la literoj.

Simila problemo koncernas la uzon de la akuzativa *-n* en tempaj adjektoj. La simpla akuzativo (rekta objekto) estas klarigita per unu frazo sur p. 9. En postaj lecionoj aperas jenaj frazeroj: *"la 15-an de decembro"* (p. 57), *"maljunulino la dudekan fojon demandas"* (p. 81), *"ni lernis kune kvar jarojn"* (p. 90), *"mi atendas kelkajn minutojn"* (p. 107).[III] Nenie estas trovebla klarigo pri la gramatika regulo, kiun ilustras la citaĵoj.

Tamen, la juĝintoj aprovis la libron por publikigo!

7. Manko de indekso

Por indiki la partojn de la teksto temantajn pri diversaj aspektoj de la lingvolernado, SZERDAHELYI uzas la saman sistemon de marĝenaj simboloj kaj geometriaj formoj, kiuj karakterizas liajn pli frue eldonitajn lernolibrojn por geknaboj. Ili signas fonetikon, gramatikon, ekzercon, klarigon, taskon sen solvo, taskon kun solvo, fakultativan taskon, averton kaj rekomendon por parkera lernado. Mi trovas tiujn 'ornamaĵojn' superfluaj. Kio vere estas bezonata en tiu ĉi lernolibro estas detala indekso, ebliganta al lernantoj rapidan retrovon de gramatikaj reguloj. En la nuna aranĝo de la libro, la materialo estas prezen-

tita en tre arbitra, nekohera maniero, kun la rezulto, ke se iu serĉas informon pri specifa punkto, estas necese trafoliumi la tutan libron.

8. Informado pri Esperanto

Grava estas la manko de sistema kaj kompleta informado pri la historio de Esperanto kaj la organizado de la Esperanto-movado. Klarigo pri la celo de Esperanto aperas nur en la lasta leciono en la formo de lingvo-ekzerco (p. 138-139). La tuto konsistas el ok linioj de Esperanta teksto por traduko en la hungaran. Pli frue en la libro, sur p. 57 de la "Enkonduko", oni povas legi la poemon "Ho mia kor'" kaj kelkajn informojn pri la Unua Libro, la pseŭdonimo "D-ro Esperanto" kaj la naskiĝdato kaj hejmurbo de Zamenhof. Kompletigas tiujn magrajn donitaĵojn listigo de tri organizaĵoj sur p. 136-137: UEA, TEJO kaj ILEI. La sigloj estas klarigitaj kaj tradukitaj en la hungaran, sed neniu adreso estas aldonita. Nekomprenebla estas la ellaso de Hungara Esperanto-Asocio (HEA) kaj Hungara Esperanto-Junularo (HEJ).

Rezultas, do, ke ĉe la fino de la libro, la lerninto estas lasita, se tiel diri, en la aero, ĉar li ne ricevas iun ajn konsilon pri la sekvaj paŝoj por perfektigi sian scion de Esperanto kaj uzi ĝin en praktika maniero. Mankas donitaĵoj pri hungaraj, internaciaj kaj fakaj organizaĵoj, la delegita reto, Pasporta Servo, kongresoj, seminarioj, alispecaj renkontiĝoj, turismaj aranĝaĵoj, radioelsendoj en Esperanto kaj internacia korespondado. La lernolibro havas neniun bibliografion kun referencoj pri aliaj lernolibroj, vortaroj, legolibroj, literaturaĵoj, revuoj, diskoj, kasedoj ks. Eĉ ne estas propono kontakti lokan grupon. Kiom da aliaj Esperanto-lernolibroj silentas pri la samaj temoj? Eble ĝuste pro tio la Esperanto-movado universala stagnas. Oni instruas, instruadas kaj pluinstruadas, sed la lernantoj forlasas kursojn, demetas lernolibrojn nur duone trastuditajn kaj malaperas, antaŭ ol ili povas esti varbitaj por aktiva partopreno en la Esperanto-komunumo.

9. Konkludo

Laŭ metodologia vidpunkto, *Kevés szó eszperantóul* havas plurajn difektojn. Efektive, io ne estas en ordo sur la tereno de la Esperantlingva instrupedagogio en Hungario, La propagandistoj de la landa Esperanto-movado sendube uzos la eldonkvanton de 11 500 ekzempleroj por ŝveligi siajn ciferojn pri la nombro de esperantistoj en Hungario nuntempe, sed mi estas tre skeptika, ĉu tiu ĉi verko rezultigos sukcesan ellernadon de Esperanto, kaj mi ne estas optimisma, ke ĝiaj aĉetintoj amase aliĝos al la hungara Esperanto-movado.

En 1979 aperis la laŭte distrumpetita lernolibro de Jozefo HORVÁTH, *30 nap alatt eszperantóul* (Esperanton en 30 tagoj)[3]. Malgraŭ siaj gravaj misoj kaj mankoj,[4] tiu verko multe pli efike informis lernantojn pri la Esperanto-movado ol faras *Kevés szó eszperantóul*. Sed preskaŭ jardekon post ĝia publikigo, ankoraŭ ne estas videbla la antaŭeniranta agado de nova ondo da esperantistoj en Hungario.

Urĝe bezonataj estas rimedoj por certigi, ke aĉetantoj de lernolibroj kaj frekventantoj de kursoj vere lernas la lingvon ĉe la elementa nivelo, ricevos kuraĝigon pliperfektigi sian lingvoscion kaj sentos emon kaj devon aliĝi al la loka kaj internacia Esperanto-movadoj. Por atingi tiujn celojn estas necesaj ĉe la komenco metodologie bone elpensitaj lernolibroj, bazitaj sur modernaj lingvistikaj nocioj pri la instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj. Plue, la enhavo de tiaj verkoj spegulu la realan kaj viglan etoson de la mondo de nuntempaj junuloj kaj plenkreskuloj. Tio signifas, ke legaĵoj devas esti aktualaj, interesaj kaj pensinstigaj. En lernolibroj por la spacepoko ne estas loko por banalaj, enuigaj rakontoj kaj versetoj por infanĝardenanoj. Multe pli enhavriĉaj legaĵoj sur ĉiuj niveloj troviĝas en la Esperanto-gazetaro. En la kazo de *Kevés szó eszperantóul*, mi demandas min, kial la aŭtoro ne ĉerpis materialon el periodaĵoj eldonataj en Hungario, kiel *Hungara Vivo*, *Budapeŝta Informilo*, *Juna Amiko*, *Sciencaj Komunikaĵoj* kaj *Fokuso*? Tuta gamo de verkoj estas haveblaj: rakontetoj, raportaĵoj, beletraĵoj, popularsciencaj artikoloj kaj fakaj studaĵoj.

Notoj de la red.

I. Tiu kasedo, bedaŭrinde, ĝis nun (komence de majo) restas ne-eldonita.

II. La vortoj "flanko, neniu, nombri" kaj "plezuro" estas signitaj pasivaj verŝajne nur pro tio, ke ili enkondukiĝas frue (ekz. "nenio*" sur paĝo 49 antaŭas la tabelvortojn sur paĝo 55). Sed, fakte, ili aperas en neniu vortlisto (krom "nombri" en la listo de pasivaĵoj).

III. Veras tamen, ke, kompare kun la hungaraj ekvivalentoj, nur la du unuaj ekzemploj bezonas klarigon.

Bibliografio

1. GOLDEN Bernard – "Kiel recenzi lernolibron? en *Internacia Pedagogia Revuo* – 1985; 15 (3): 75-77.
   Publikigita ankaŭ en: *Esperanta Finnlando* 1985; 5: 12-13; *Informilo pri la Instrua Laboro* 1985 dec.: 8 (mallongigita versio); *Esperanto Teacher* 1986 printempo; 149: 9.

2. CORSETTI Renato, LA TORRE Mauro, VESSELLA Nino – *Lingua Esperanto, Corso di base* – Edistudio, Pisa: 1984 – 302p.

3. HORVÁTH Jozefo – *30 nap alatt eszperantóul. Eszperantó nyelvkönyv* – Magyar Eszperantó Szövetség, Budapest: 1979 – 283p.

4. GOLDEN Bernard – "Aldonaj rimarkoj pri *30 nap alatt eszperantóul*" en *Budapeŝta Informilo* – 1980 junio; 11 (6 [116]): 25-27.

Fernando DE DIEGO – *Nuevo método de Esperanto para clases y autodidactas* – Heroldo de Esperanto, Madrid: 1982 – 214 p.

Jam la titolo de ĉi tiu nova lernolibro verkita por hispanoj kaŭzas problemon. Ĝi estas nur relative nova, eldonita antaŭ ses jaroj, sed alveninta antaŭ nelonge al la recenzanto. Nome, la problemo por kiuj "klasoj" estas destinata la libro? Ĉu por baz- aŭ mezlernejaj klasoj, ĉu por alitipaj grupoj de la organizita instruado? Ni esperu, ke la analizado de la enhavo laŭ metodologiaj kaj didaktikaj kriterioj liveros kontentigan respondon, kiel ankaŭ al la demando: kio estas la esenco de ĉi tiu "nova metodo"?

En dek dialogoj klopodas la aŭtoro pentri kompletan bildon de la gramatiko de Esperanto, en tia formo, ke ĝi estu samtempe alproprigebla por la lernantoj/studentoj. Mi diras "bildon", ĉar sistema resumo de gramatikaj reguloj ne troveblas en la lernilo. Verdire, la aŭtoro mem intencis prezenti la gramatikon per la indukta metodo, do tiel, ke "oni alvenas al la gramatiko deirante de la tekstoj". Nur la demando estas, ĉu tio sufiĉas; tiu metodo estas kutima, uzata kaj efika, tamen estas konsiderende, ĉu — almenaŭ aldone — ne pliigus la efikon de la studado ia sinteza koncepto pri la gramatika strukturo de la lingvo, precipe en kazo de Esperanto, kies bazajn regulojn jam Zamenhof resumis en 16 punktoj? Eble la aŭtoro mem konsciis ĉi tiun mankon, doninte al la komenca parto de la libro kelkajn tabelojn strukturismajn de la kompleksaj verboformoj, la tabelvortoj kaj afiksoj. La du lastaj estas vere utilaj, la unua verŝajne nur timigas la lernantojn en la komenco de iliaj studoj. Pri la apliko de la rezultoj de strukturismo ni trovas eĉ rektan provon en alia enkonduka ĉapitro titolita "strukturaj elementoj", en kiu la aŭtoro logike prezentas la gramatikajn morfemojn kaj la sistemon de vortderivado kaj vortkunmetado en Esperanto.

La bezonatan vortprovizon la lernantoj devas alproprigi per multflanka aplikado de la tekstoj/dialogoj kaj per parkerigo de la vortlistoj.

Ĉi tie nepre estas bezonata lerta kaj inventema instruisto/profesoro por doni ekzercojn, modelojn de la praktikado. Kaj pri la praktikado de la gramatika kaj leksika materialoj: en nenia metodo sufiĉas la du tipoj de ekzercoj proponataj de la libro, nome, la tradukado el la hispana al Esperanto kaj inverse. Tiel la uzado de la libro tute ne plenumos sian celon, la elformigon de aktivaj kapabloj paroli, kompreni, skribi kaj legi en Esperanto. Sed pozitivaĵo de la leksika materialo estas, ke ĉe ĝia kompilado la aŭtoro tre sperte utiligis la rezultojn de la kontrasta metodo. Eĉ, en la fino de la libro li donas bonegan liston de vortoj havantaj la saman aŭ tre similan formon en ambaŭ lingvoj, sed tute diverĝajn signifojn, por eviti la misan uzon de internaciaj vortoj. Ankaŭ estas utilaj kaj interesaj la listoj de esprimoj de ĉiutaga konversacio, kvankam prezentantaj la saman problemon: kiel ilin alproprigos memstare la lernantoj?

Ŝajnas, ke spite al la titolo, la efika uzado de la libro nepre kondiĉas la aktivan intervenon de instruisto. Tial ni diru, ke la lernolibro estas bone uzebla por hispanlingvaj plenkreskuloj en formoj de organizita instruado. Por aliaj aĝogrupoj aŭ por la memstara lernado tute ne: ĉi lastaj maksimume konfuziĝos pro la enhava riĉeco de la libro, kiun cetere kompletigas tre valoraj finaj ĉapitroj pri metriko, literatura kaj scienca aplikadoj, movadaj informaĵoj ktp. Kaj pri la "noveco" de la metodo? Certe ĝi estas nova nur pro la pionireco de ĉi tiu lernolibro en Hispanio.

VHZs

Edmond LUDWIG & Renée TRIOLLE – *Nouveau cours d'espéranto avec ou sans professeur* – Heroldo de Esperanto, Madrid: 1986 – 194 p.

La kompleta titolo de ĉi konvene helverda lernolibro estigas du dubojn: ĉu ĝia noveco fakte estas io fundamenta kaj metodologie valida, aŭ temas nur pri novaperinteco? Ĉu ĝi — kaj entute: ĉu iu lernolibro — povas esti samtempe destinita por memstaraj kaj memsidaj (pardonu: enkursaj) lernantoj? (Ĉi tiu dua demando leviĝas ankaŭ rilate al la ĉi-supre recenzitaj du lerniloj, kaj mi emus prirespondi ĝin nee.)

Ni vidu do iom kiel mienas kaj internas la lernolibro. Post tujkomenca bibliografieto "Por scii pli pri Esperanto" kaj "Por pli bone lerni" — kvazaŭ la verkintoj esperus, ke novkonvertito tuj flankenmetos ilian libron por enprofundiĝi alilibre! — paĝo 7 pensigas pri lernolibro de la angla, kie oni enkonduke demandus "Kio estas la angla?" kaj "Kial la angla?". Sed for kun tiaj malicaj pensoj, Esperanta lernilo devas kompreneble (kaj bedaŭrinde) ne nur instrui, sed ankaŭ informi, propagandi, konvinki kaj varbi. Kion la verkintoj faras koncize kaj oportune, kvankam ... estas ĝenerale konate, ke Zamenhof *ne* estis polo*. Oni tre lerte mencias, ke Esperanto estas konstruita lingvo *samkiel* aro da naciaj lingvoj modernaj; estas menciitaj la reguleco kaj logikeco de Esperanto. Laŭ mi mankas akcento pri la multaj similecoj de Esperanto kaj la franca, atentigo pri samecoj kaj diverĝoj — kiel la listo de "falsaj amikoj" en la porhispana libro de DE DIEGO; ankaŭ en la bibliografieto ne aperas la ĉi-rilata verko de A. RIBOT kaj R. BERNARD: "Falsaj amikoj en Esperanto". Ĉu por ne trokuraĝigi francajn lernantojn? La resumo "La gramatiko dum palpebrumo" (pp. 11-12) estas tre konvinka; domaĝe, ke la iom timiga korelativa tabelo aperas ne ie poste en la libro. La fonetikaj klarigoj (pp. 15-16) daŭre aludas la francan, sed, kompreneble kion alian fari? Tiun klasikan mankon de internacilingvaj lerniloj povas forigi nur magnetofona bendo.

Antaŭ ol transiri al la lecionoj mem, konstatendas, ke mankas ekzercigo de la antaŭparolaj gramatikaĵoj; tial la lernanto "estas ĵetata en profundan akvon" ĉe la unua leciono. La mezlongajn — maksimume unupaĝajn — bazajn tekstojn de la dek du lecionoj sekvas pritemaj demandoj; vortolisto kun tamen kelkfoja, sed iom magra komparo kun la rilataj francaĵoj; ekzercoj kun librofinaj solvoj; ekzemploj pri afiksoj kaj sufiksoj; ŝanĝiĝa kvanto da novaj gramatik-

aĵoj. La ekzercoj ŝajne rilatas al la *poste* klarigita gramatiko, sed tio ne tro gravas. Pli ĝenas ilia monotoneco. Post la kvina leciono, ekzemple, ĉiuj ses ekzercoj estas transformo de frazoj laŭ antaŭdonita modelfrazo. Troveblas ankoraŭ kompletigoj, unusola traduko — el la franca (p. 25) — kaj apenaŭ io pli. Tute mankas konversaciigaj demandoj (eble ĉar memlernantoj ne bezonas tiujn?), tradukoj el-Esperantaj kaj praktike ankaŭ alidirektaj. (Traduko estas unu el la malmultaj ebloj plibonigi stilon jam dum komenca kurso — kvankam oni ne troigu kiel DE DIEGO faris per la ekskluziva uzado de tradukoj kiel ekzercmaterialo.)

La lecionoj pritemas la vivon de diversaj membroj de la familio Hom, kun la ĝusta dozo de internacieco (la patrino parolas kun la filo Ralf de la junaĝo germane, kaj li poste iras studi la lingvon en la cellando) kaj esperantisteco ("ĉiuj anoj de la familio parolas Esperanton"; la lastaj du lecionoj pritemas Universalan Kongreson: "La mondkongreso" kaj "Postkongresaj konsideroj"). La tekstoj sukcesas esti pli interesaj ol la kutimaj priĥamiliaj ripetajoj dank' al ilia konversacia karaktero: lecionoj 2, 3, 5, 7, 9 prezentas viglajn dialogojn; la naŭa eĉ titoliĝas "Disputo inter gefratoj", dum la sepa fariĝas fine ekologia diskuto, kaj la sesa ekzemplas la tiel gravan ĝenron de letero.

La tria parto enhavas kvardekon da paĝoj, kiuj liveras elstaran antologieton de la originala kaj traduka Esperanta verkado (Saint-Exupéry, Valáno, Sekelj, Lorjak, Schwartz kaj aliaj) eĉ kun artikolo el *Monato*. Bedaŭrinde, inter la paĝoj 151 kaj 190 okazis iu stranga konfuzo: la numerado nenie kongruas kun la enhavtabela indiko.

Fine sekvas kelkaj informoj pri interpunkciado (tre simplige), vortdivido, mallongigoj kaj versfarado — ĉi-lastan ilustras bone elektitaj poemoj. (Konvenus tamen signi, se temas nur pri fragmenta cito.) La lasta ĉapitro alfabete informas pri bibliotekoj, kanzonoj, komerco, kongreso, ktp. — diversaj facetoj de la Esperanta vivo. Tromalice ni menciu la nemencion de la budapeŝta Esperanto-fako ĉe la kapvorto "Universitatoj" ...

La respondo al niaj komencaj demandoj do ŝajnas: la libro ne kaŭzos metodologian revolucion, sed ĝi plurrilate superas la mezan nivelon (intereseco, informriĉeco, viva lingvaĵo, prezento de pluraj stiltavoloj); ĝi taŭgas pli por kurso ol por individuo (pro la senvarieco de la ekzercoj, pro la nefacila retrovebleco de gramatikaĵoj).

István ERTL

ALVOKOJ

GERMAIN PIRLOT, Kemmelbergstraat 5/b.3, B-8400 Oostende, Belgio, kompiladas informojn pri la leĝa situacio de Esperanto en la lernejoj (elementaj, mezgradaj, superaj) kaj ĉefe pri ĝia *oficiala* instruado en universitatoj kaj superaj institutoj.

Se vi povas helpi iamaniere, kontaktu lin kaj/aŭ instigu kursgvidant(in)ojn de *oficialaj* Esperanto-kursoj je supera instruado, por ke ili informu S-ron Pirlot.

Tiu alvoko ĉiam validas. Antaŭdankon pro via kunlaborado.

EDWARD SYMOENS, Putsesteenweg 131/2, B-2180 Kalmthout, kompiladas informojn pri universitataj aŭ altlernejaj tezoj, disertacioj aŭ diplomverkoj rilate al Esperanto, interlingvistiko, la internacia lingvoproblemaro k.s.

Bezonataj informoj: nomo kaj adreso de la verkinto, titolo de la verko, Universitato aŭ Altlernejo en kiu la diplomo estas akirita, eventuale la fonto de la informo (revuo, rekta informo ktp.).

■ La VI-a internacia metodologia seminario en Strážnice

La sudmoravia urbeto Strážnice estas konata ne nur pro siaj riĉaj folkloraj tradicioj kaj bona vino. En tiu ĉi urbeto travivis siajn knabajn jarojn neniu malpli grava ol Jan Amos Komenský, do Komenio, instruisto de nacioj. Inter la 19-a kaj 24-a de aprilo 1988 li fariĝis spirita patrono de pedagogia kunveno, kiun partoprenis kvardeko da Esperanto-instruistoj el ses landoj. Sub la aŭspicioj de ILEI, reprezentita per la sekretario Marin Bacev, la komisiitoj por IMS-oj Zsuzsa Barcsay kaj Till Dahlenburg kaj la organizinto de antaŭaj du IMS-oj Irena Szanser. La enkonduka prelego de Zsuzsa Barcsay analizis fakajn programerojn kaj resumis la problemaron de la antaŭaj seminarioj, okazintaj en Pollando, Hungario kaj Bulgario. Realiĝo de la sesa IMS en Ĉeĥoslovakio donis al ĉeĥaj Esperanto-instruistoj bonan eblecon renkonti siajn eksterlandajn gekolegojn kaj pridiskuti kun ili siajn ideojn kaj spertojn. La ĉeftemo "Evoluigo de la kvar komunik-kapabloj" estis pritraktata dum tri prelegtagoj en 19 prelegoj (el kiuj tiuj de Kovács kaj Donhai laŭtlegiĝis pro neĉeesto de la koncernaj prelegantoj):

1. Dan Maxwell (NL) – Du kvinlandaj eksperimentoj (raporto pri pedagogiaj eksperimentoj en instruado de Esperanto kaj de fremdaj lingvoj).
2. Till Dahlenburg (GDR) – Interligo inter ĝenerala klerigado kaj Esperanto-instruado.
3. Achim Zettier (GDR) – Pri la rolo de la lernpsikologio por efika instruado.
4. Márta Kovács (H) – Test-ekzercoj por fortigi perceptivajn kaj reproduktivajn kapablojn.

5. Stano Marĉek (CS) – Aŭdvida Esperanto-kurso por progresintoj (praktika montro helpe de lumbildoj kaj sonkasedo).
6. Josef Vojáček (ĈS) – Modernaj instrumetodoj kaj ilia aplikado en la lingvo-instruado.
7. Ilona Koutny (H) – Komputilo: kontribuo al la evoluigo de skribo kaj aŭskulto (kun praktika ekzemplo de parolsintezo).
8. Katalin Kisfaludy (H) – Enkonduka komputila Esperanto-kurso (Bedaŭrinde, pro manko de bezona komputilo, la aŭtorino ne povis montri sian programon ankaŭ praktike).
9. Miloš Bloudek (ĈS) – Esperanto en komputilaj programoj (Praktikaj ekzemploj).
10. Irena Szanser (PL) – Psikologiaj kaj lingvistikaj konceptoj influantaj la metodologion de fremdlingva instruado.
11. Pavla Jodasová (ĈS) – Principoj de informiva instruado.
12. Linhart Rýznar (ĈS) – Rektmetoda instruado kaj ĝiaj instruhelpiloj.
13. Stefan MacGill (H) – Al parola lerto per komuniksituacia sperto.
14. Jan Řepa (ĈS) – Kluboj de internacia amikeco (Propraj spertoj kaj konkludoj).
15. Miroslav Malovec (ĈS) – Problemoj de skribaj kursoj (Analizo de plej oftaj eraroj de lernantoj).
16. Magda Šaturova (ĈS) – Bazaj leksikologiaj principoj de dulingvaj vortaroj.
17. Ivanka Spasova (BG) – Ekzercoj en Esperanto-instruado por progresantoj (kun praktikaj ekzemploj).
18. Cao Donghai (ĈPR) – Komparado kaj induktado de gramatikaĵoj por progresintoj.
19. Václav Horčička (ĈS) – Esperanto en lernejoj (konsideroj).

Prelegoj 6 kaj 13 estos publikigitaj en *Starto*, plejparto de la aliaj (1, 2, 3, 4, 7, 10, 12, 16 kaj parte pliaj) estis surbendigitaj kaj do disponeblaj ĉe la magnetofona servo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Krom la prelegoj oni havis okazon babili pri Somera Esperanto-Tendaro en Lančov kaj pri la pasinta Universala Kongreso de UEA en Varsovio. La programon kun diapozitivoj preparis Pavla Jodasová kaj Jan Pavlík. Dum ekskursa tago oni vizitis interesan muzeon de folklora arĥitekturo, skanzenon en Strážnice, kastelon en Milotice kaj barokajn vinkelojn en Petrov. Al la amuzprogramo apartenis prezentado de folklora grupo Lipina kaj ĝia kordcimbala muzikista grupo el Vraĉov.

La ILEI-respondeculoj kaj organizinto de la sesa IMS kunsidis fine de la seminario por konkludi, komenti kaj rekomendi pluan laboron. Jen kelkaj el la rekomendoj:

— La venonta IMS okazu laŭeble en Slovakio; ĝia kadrotemo estu "Lingvopedagogiaj aspektoj de la Esperanto-instruado; specife
kapabligo de instruistoj kaj lernantoj je lingvaj komparoj (konsciigo pri interferoj k.s.),
apliko de lingvaj scioj (transiro de receptivaj kapabloj al produktivaj) cele al
morala edukado kaj plivastigo de ĝenerala klereco.
— En ĉiu IMS estu resuma informo pri la plej gravaj aktualaj tendencoj en la instruado de etnaj fremdaj lingvoj, inkl. analizon kaj adapton de elektitaj etnofremdlingvaj lernolibroj.
— Regule okazu prezentado kaj preparita prijuĝo de nove aperintaj lernolibroj kaj aliaj instruhelpiloj de Esperanto.
— En la programo estu antaŭvidata ankaŭ esperantologia prelego pri temo, kiu estas grava por la praktika lingvoinstruado.
— Unuopaj temoj el la kadroprogramo de unueca kvalifiko de kursgvidontoj ankaŭ en la estonteco estu traktataj en IMS-oj.
— La ĉeestantoj estu aktivigataj pere de modellecionoj kaj testado rilate al difinitaj lingvopedagogiaj problemoj.
— Estas dezirinde, ke la eksterlandaj gastoj havu eblecon renkontiĝi kun la pedagogia sekcio de la koncerna L.A.
— La anticipa informado pri la IMS-oj estu frua kaj publika!

— Gvida funkciulo de la L.A., krome reprezentantoj de ŝtataj, politikaj kaj klerigaj instancoj partoprenu almenaŭ la malfermon de la IMS-oj.
— Superrigardo pri la enhavo de la ĝisnunaj IMS-oj estu kompilota kaj publikigota en la revuo *Esperanto* kaj *IPR*.

V.K. Barandovská, pedagogia sekcio de ĈEA,
Zs. Barcsay kaj
Dr. T. Dahlenburg, komisiitoj pri IMS-oj flanke de ILEI

▼ Nova revueto "La racia lingvo"

Distrikta estraro de GDR ekde 1987 eldonadas la germanlingvan revueton *Die rationelle Sprache* (La racia lingvo), kiu informas esperantistajn kaj neesperantistajn legantojn pri la aktivecoj de GDREA, pri la evoluo de la internacia Esperanto-movado, pri la senco de okupiĝo pri Esperanto kaj pri la aplikeblecoj de tiu planlingvo. Tiel ĝi celas disvastigi publikan scion pri Esperanto en GDR kaj motivigi interesitojn lerni la lingvon.

Die rationelle Sprache aperadas sesfoje jare kun po 8 paĝoj. La lasta paĝo de ĉiu eldono, kiu enhavas rakontetojn, humuraĵojn, poezion, informojn, anoncetojn ktp., estas esperantlingva.

La redakcio daŭre bezonas aktualajn informojn rilate la progreson de la Esperanto-movado kaj petas ĉiujn organizaĵojn, estrarojn, aktivulojn sendi aktualajn materialojn pri la diversaj aktivecoj kiel: planitaj aŭ okazintaj aranĝoj, atingitaĵoj (ekz. ekinstruo aŭ ekuzo de la lingvo), eldonaĵoj, iniciatoj ktp. La respondeca redaktoro dankas anticipe por la kunlaboremo.

▼ Aperas "Ĉeroka Esperantisto"

(el letero al la redaktejo)

Mi estas juna ĉeroko, fraŭlo, kiu eldonas gazeton. Mi parolas la rapide pereantan ĉerokan lingvon. (...) Dum du jaroj mi aktivis en Esperant-

ujo (...), en 14 landoj. Mi estas dumviva membro de UEA. (...) Mi nun estas en malliberejo. Mi frontas mortpunon pro krimoj, pri kiuj mi estas senkulpa. Detaloj pri tio aperos en mia gazeto. (...) Ĉiu numero de la gazeto enhavos interalie:

1. Ĉeroklingvan sekcion kun Esperanta traduko, kiu estos io el ĉeroklingva literaturo;
2. Sekcion pri ĉerokaj gramatiko kaj lingvistiko;
3. Sekcion pri ĉerokaj historio kaj kulturo.
4. Rubrikon pri "Poliespo".

(...) Kiam Zamenhof prezentis Esperanton al la mondo, Ĉerokujo estis sendependa nacio. (...) En 1828 aperis "La Ĉeroka Fenikso", la unua indianlingva gazeto en la mondo. (...) Ĉerokoj estas la sola indiana popolo kun propra skribsistemo. Ĝi estas silabaro inventita de Sequoyah.

En la gazeto mi pritraktos la demandon ĉu Zamenhof studis la ĉerokan lingvon? (...) Ekzistas grandaj kaj gravaj similaĵoj inter la ĉeroka kaj Esperanto (kunmetiteco kaj afikseco, vokaloj *a/i/o/u* kun simila gramatiko rolo kiel en Esperanto, demanda silabo "ĉu".

(...) Kio estas "Poliespo"? Ĝi (...) estas polisinteza Esperanto. Ĝi estas indiana lingvo (...) kiu uzas la ĉerokan polisintezan sistemon. Poliespo estas la plej facile akirebla polisinteza lingvo. (...) Poliespo estas via ora ŝanco akiri indianan spiriton.

Bonvolu enmeti internacian respondkuponon kun via letero por ebligi mian respondon. Mi rapide respondos. *La Ĉeroka Esperantisto* aperos dufoje en ĉiu monato. Mi sendos ĝin senpage dum unu jaro al ĉiu, kiu donacos al mia leĝdefenda fonduso sumon egalan al UEA-kotizo en kategorio MA (−K). Bonvolu do sendi 35 dolarojn usonajn per internacia poŝtmandato, pagebla (...) al jena adreso: Billy R. Waldon, c/o Max Brande, 425 S. New Hampshire 204, Los Angeles, CA 90020 USA. Aŭ sendu 70 ned. gld. al UEA en Rotterdam por la konto de Billy R. Waldon. Se vi ne povas donaci tiom, donacu kiom vi povas kaj mi sendos al vi la gazeton laŭ mia povo.

Mi ne monavidas. Mi sendus ĝin senpage al ĉiuj, se mi povus. La unua numero jam haveblas. Nur tiun vi ricevos kontraŭ 3 int. resp. kup. aŭ 2 dolaroj.

B.R. Waldon; ĉeroklingve N.I. Sequoyah

◆ ***Opus Nigrum***

Aperis numeroj 1987/3 kaj 1987/4 de la periodaĵo de la budapeŝta Esperanto-fako *Opus Nigrum*. La n-ro 3 enhavas Esperante novelon originalan de Georgo Kamaĉo kaj tradukitan de Aleksandr Kuprin, vojaĝrakonton de Marco Dutra kaj poemojn. La n-ron 4 konsistigas kompleta, ilustrita hungara traduko el *La Infana Raso* de William Auld. Post la ĝisnuna "egal-lingveco" *Opus Nigrum* estos 70% esperantlingva, 30% hungara. Aperas kvar numeroj en jaro. Unuopa ekzemplero mendeblas kontraŭ 3 respondkuponoj, jarabono kostas 10 kuponojn. La adreso de la redaktejo samas kun tiu de IPR.

Raportoj

22a KONFERENCO DE ILEI

Kerkrade (NL), 16-23 julio 1988

Ĝis la unua de julio proksimume 90 personoj aliĝis al ĉi tiu aparte grava faka renkontiĝo de esperantistaj geinstruistoj, dum kiu i.a. jenaj temoj estos pritraktataj:

1. Informaj demonstracioj pri diversaj metodoj, kadre de la konferenca temo "Tradiciaj kaj modernaj instrukonceptoj en la instruado de Esperanto".

a) *Prelegoj:*
Marin Bacev (BG) – La sugestopedia metodo
Oene Hoekstra (NL) – La esplorkreiva metodo
Zlatko Tišlar (YU) – La Zagreba metodo
Jozefo Horváth (H) – La "pirata" metodo
Audrey Childs-Mee (NL) – La Cseh-metodo
A.S. Melnikov (SU) – La metodo per didaktikaj ludoj
Ilona Koutny (H) – La komputila metodo.
Stefan McGill (H) – La situaci-komunika vojo

b) *Pliaj metodologiaj diskutrondoj kun:*
John Ibbotson (Britio)
Denis E. Keefe (Usono)
Zhang Danchen (Ĉinio).

2. Pridiskuto kaj aprobo de tri ekzamendosieroj
a) Internaciaj Ekzamenoj, kiuj okazas dum la Universalaj Kongresoj de UEA;
b) Instrurajtigaj kursoj kaj ekzamenoj;
c) Internacia Unueca Ekzamensistemo pri trinivela lingvoscio.

3. Interna funkciado de ILEI
a) Adapto de la statuto kaj regularo

b) Komunikado kun la membroj:
— Internacia Pedagogia Revuo (IPR)
— eldono de dumonata novaĵletero
— eldonprogramo de libroj kaj broŝuroj
c) Funkciado kaj konsisto de la sekcioj
ĉ) Starigo de novaj sekcioj kaj/aŭ akcepto de reprezentantoj
d) Financaj aspektoj de la asocio:
— situacio de kandidat-membroj en nepagipovaj landoj
— ellaborado de ĉiujara buĝeto
— principoj pri financaj intervenoj
— kiel akiri pli da enspezoj
e) Aprobo de trijara laborplano
f) Starigo de konstanta, fiksa ILEI-Centro
g) Estontaj ILEI-konferencoj
h) Varbado de novaj membroj

4. Ekstera agado
a) Rilatoj kun UEA
b) Rilatoj kun la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)
c) Rilatoj kun aliaj kunlaborantaj institucioj
ĉ) Organizado de la "Tago de la Lernejo"
d) Kunlaboro kun la Terminologia Esperanto-Centro de UEA
e) Kunlaboro en la Internaciaj Metodologiaj Seminarioj
f) Kunlaboro kaj apogo de la universitataj docentoj
g) Rilatoj kun Unesko.

5. Diskutoj pri fakaj programeroj
a) La Lerneja Projekto (Brown) de UEA
b) Produktado de aŭdvidaj kasedoj kun serio de modellecionoj
c) Kiel organizi, internaciskale, perfektigajn kursojn por geinstruistoj?
— pere de korespondaj kursoj
— pere de seminarioj
ĉ) Disponigo de ekspozici-materialo.

6. Elektoj

Tre grava, eĉ decida okazaĵo por ILEI estas la elekto de nova, dinamika estraro por la daŭro de tri jaroj.

7. Cseh-aranĝoj

Laŭ la enskriboj estos organizataj:

a) Cseh-kurso por komencantoj
b) seminarioj A kaj B por instruantoj de Esperanto
c) renkontiĝoj por interŝanĝi spertojn.

Praktikaj informoj

— LKK-sekretariino: s-ino Mila van der Horst-Kolińska, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Tel. 70-556677 (inter la 10a kaj 15a horoj).
— Ĉiuj aliĝintoj ricevos antaŭ la Konferenco pli detalan programon, horaron kaj praktikajn informojn pri la konferencejo.
— En la paperujo troviĝos, plie, labordokumentoj pri ĉiuj pritraktotaj programeroj, por faciligi kaj plirapidigi la diskutojn.
— Aliaj programeroj eventuale aldoniĝos lastmomente.

23a KONFERENCO DE ILEI

Ĝi okazos en 1989, tuj *post* la Universala Kongreso de UEA (Brighton) en la Gwent College of Higher Education, Caerleon (Newport), Suda Kimrujo (inter Cardiff kaj Bristol).
Kadrotemo: Motivado en la lerneja instruado de Esperanto
Kontaktadreso: s-ro Arnold Pitt, Brita sekciestro de ILEI, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster HR6 8QD, Britio

INTERESAJ LABORRENKONTIĜOJ

Je la sojlo de la dua jarcento de Esperanto estas utile mediti kaj diskuti pri la nuna stato de la Esperanto-movado, antaŭ ol lanĉi novajn programojn kaj planojn. Por tiu celo okazos pluraj konferencoj.

La unua konferenco estos kvazaŭ daŭrigo de la simpozio "Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo", aranĝita apud Varsovio fine de aprilo 1984. Ĝi okazos en Szeged (Hungario), 13-16 julio 1988. Informoj ĉe Hungara Esperanto-Asocio, Segedo 88, P.F. 193, H-1368 Budapest.

La dua estos 'movadologia' simpozio pri la temo "UEA al nova strategio por nova jardeko". Ĝi okazos dum sabato, la 23an de julio 1988, ĵus antaŭ la Universala Kongreso. Informoj ĉe: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

La tria okazos dum la "Tago de la Lernejo" en la kadro de la UK en Roterdamo. Ĝi pritraktos pli specifajn aspektojn de la estonta agado: La ĝustaj formoj de la lerneja politiko koncerne la oficialan enkondukon de Esperanto en lernejojn. Informoj ĉe: E. Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Kalmthout.

La kvara grava renkontiĝo estos internacia seminario en Ahrenshoop (GDR), de 5 ĝis 10 decembro 1988, pri la temo "Sojle de la dua jarcento: Esperanto-lingvo kaj -parolantaro. Kion konservi, kion ŝanĝi?" Informoj ĉe: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Otto-Nuschkestrasse 1, DDR-1080 Berlin.

NOVA FAKLITERATURO EN ESPERANTO: *MINERALNOMOJ*

Kvankam ĝi ne havas pedagogian valoron, sed tamen estas grava ilo por universitataj studoj, eble por esperantistaj instruistoj pri geologio, ni mencias la eldonon de listo de proksimume 3000 mineralnomoj. La

liston redaktis Tom HØG, universitata bibliotekisto en Oslo, kiu multe okupiĝas pri geologio kaj mineralogio. Post la norvega nomo sekvas la nomo en la Internacia Lingvo kaj en la angla, la etimologio, la kemia formulo kaj la numero laŭ la Dewey-sistemo por klasifikado de mineraloj. Informoj ĉe: Odd Tangerud, Lillebo, Horgenvegen, N-3300 Hokksund.

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ SAN MARINO (AIS)

Antaŭ kelkaj monatoj, la estraro de ILEI subskribis deklaracion, en kiu ĝi agnoskas kaj promesas agade subteni la Akademion Internacian de la Sciencoj. Ĝi esploros la rimedojn per kiuj ILEI plej efike kaj laŭstatute (art. 4.8) aktive povos kunlabori kun tiu elstara institucio.

Ekde la 2a de majo 1987 la Akademio de Sciencoj (AIS) San Marino plenjure ekzistas. Ĝi estas institucio fondita laŭ decido de 1983-05-19 de la Sanmarina Registaro, agnoskita 1986-11-25 de la "Konsilio de la XII" (la plej supera instanco de la Respubliko San Marino). Ĝi estas esence ne ŝtata, sed internacia, do en sia agado ne dependa de direktivoj de la registaro de San Marino, kiu tamen materie apogas la Akademion.

Kvankam AIS uzas por konferencaj prelegoj en limigita procentaĵo ankaŭ siajn kvar aliajn oficialajn lingvojn (la anglan, la francan, la germanan kaj la italan), la ĉefa laborlingvo laŭstatute estas la Internacia Lingvo. Ĉi tiu estas ekskluzive uzenda: 1e por ĉiuj kunsidoj kaj protokoloj de la Senato kaj de la Ĝenerala Asembleo; 2e por la kursoj kaj lekciserioj kiuj validas por la oficialaj ekzamenoj ĉe AIS, kaj 3e por la kandidat-prelegoj de tiuj, kiuj celas akiri aŭ agnoskigi pere aŭ flanke de AIS siajn sciencistajn gradojn aŭ titolojn. Per tio AIS fariĝis la

unua ŝtate agnoskita universitateca institucio de la parolantaro de la Internacia Lingvo en la mondo! AIS do estas ponto inter la scienca mondo kaj la Esperanto-movado...

Ĉiuj apogantoj de la Internacia Lingvo en kaj ekster la organizita Esperanto-movado estas alvokitaj al apogo de AIS por stabiligi kaj kreskigi ĉi tiun institucion nemalhaveblan por la plua enradikigo kaj disvastigo de ĉi tiu nekontesteble plej moderna, preciza, esprimriĉa, kaj tamen facila vivanta kulturlingvo de la mondo.

Kiel eblas apogi AIS?

Ĉiu kultivita homo, ĉu komencanto ĉu progresinto de la Internacia Lingvo, estas invitita aliĝi al la sciencaj kaj kulturaj aranĝoj de AIS, precipe al SUS (Sanmarina Universitata Sesio) en San Marino. La estraro rajtas aligi kiel subtenantajn membrojn (SMdAIS) kun voĉdonrajto ne nur sciencistojn, sed ankaŭ aliajn apogantojn, kiuj pretas pagi jarkotizon (DM 100 aŭ 50 internaciajn respondkuponojn).

Plenumante sian regularon AIS celas kunigi en sian Internacian Sciencistan Kolegion (ISK) — t.e. en la plej vastan rondon ĉirkaŭ AIS, el kiuj la efektivaj membroj kaj la adjunktaj apartenantoj estas alvokeblaj — ĉiujn sciencistojn en la mondo (kaj dokumentadi ilin per kontakt-registro "Internacia Sciencista Dokumentaro"), kiuj:

1. estas jam akirintaj ie en la mondo sciencan nivelon proksimume egalan al la bakalaŭreco (do postulantan minimume 2-3 jaran universitat-nivelan studadon),
2. posedas propraopinie la kapablon kompreni — almenaŭ helpe de vortaro — tekstojn skribitajn en Esperanto, kaj
3. aprobas la principon de la sennacieco de sciencoj kaj la celon de AIS, iom post iom redukti la lingvodiskriminacion en la internacia scienca kunlaborado.

La aliĝo al ISK okazas per plenumo de "pripersona informilo" havebla ĉe la prezidanta sekretariejo de AIS. La simbola jarkotizo (ekde 1988 du internaciaj respondkuponoj aŭ DM 4,–) estas krome la nura postulo ligita al ĉi tiu paŝo al la Akademio de Sciencoj.

Sciencistoj, kiuj jam akiris sciencistan gradon aŭ titolon kun bona rezulto kaj kiuj bone parolas la Internacian Lingvon, estas invititaj helpi per partopreno en la proceduro de la "adapta adopto" stabiligi la reputacion de la sciencaj gradoj agnoskitaj de AIS. Helpi oni ankaŭ povas per diskonigo de la ekzisto kaj aktivecoj de AIS, ĉu inter privataj konatuloj kiuj siavice apogu, ĉu per publikaĵoj en nacilingvaj aŭ internacilingvaj gazetoj. Kompletajn informojn oni ĉerpu el la oficialaj sciigoj de AIS, kiuj aperadas en Esperanto ekde 1983 en la kvarlingva kvaronjara revuo *Humankybernetik* kaj en ties kromvolumo "Ekesto kaj celoj de AIS"; ilin senpage ricevas la SMdAIS, kaj en ĉiuj universitataj bilbiotekoj ili devus esti troveblaj. Kontaktadreso por pluaj informoj kaj aliĝoj: Prezidanta sekretariejo de AIS, Kleinenberger Weg 16b, D-4790 Paderborn.

Jus aperis "Oficialaj Sciigoj de AIS", kun la provizora, unuecigita ekzamenregularo, listoj de novaj membroj kaj la programo por la 5-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 5), okazonta de 1988-08-27 ĝis 09-05 en la Convento S. Maria dei Padri Servi di Maria, Borgo Maggiore Valdragone, Respubliko de San Marino.

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Szerdahelyi István †
Vicprezidanto : Symoens Edward, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout)
Sekretario : Dazzini Catina, Casella Postale 22, I-54100 Massa
Vicsekretario : Bâcev Marin, BG-1000 Sofio, Pf. 1054
Kasisto : Andreasson Bertil, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby

HONORAJ MEMBROJ

Zlatnar Peter (YU, 1984) – Dazzini Mario (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Klemola Irja (SF, 1986) – Olsson Olle (S, 1986) – Toczyński Jozef (PL, 1986)
Sonnabend Helmut (D, 1987)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstrujo : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgujo : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilio : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britujo : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Ĉinujo : Zhang Danchen, Huazhong Normal University, Wuhan PR China
Finnujo : Pentti Järvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanujo: Stefanie Tucker, Lilienthalstr. 3, D-6900 Augsburg
Hispanujo : Manuel López Hernández, Sol 75, E-41003 Sevilla
Hungarujo: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : David Mager, P.K. 4246, IL-84142 Beer-Ŝeva
Italujo : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanujo : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp. : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Ian Richmond, 66 Naomee Cres., London, Ont. Canada N6H 3TS
Norvegujo : Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Pollando : Tadeusz Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92 547 Łódź
Portugalio : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio : Rûzena Vojtechová, Bytovky blok "B", CS-05960 Tatavanská Lomnica
Sovet-Unio : Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Sud-Afriko : Jape Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedujo : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby
Svisujo : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo : J.E. Bachrich, Apartado 3833, YV-1010 A Caracas
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Pirlot Germain, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende

Didaktikaj lud(il)oj : Sossois Georges, rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESCO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
Fairbank James, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, F-75016 Paris

FIMEM : Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 35 Avenue Jottrand, B-1030 Bruxelles

ICEM : Institut Coopératif de l'Ecole Moderne, Le Pallet, F-44330 Vallet

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

SAT : Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris

EC : Esperanto Centro, Pf. 1450, D-4790 Paderborn

EEC : Eŭropa Esperanto Centro, Schotlandstraat 73, B-1060 Brussel

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

IKS : Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

KSM : Koresponda Servo Mondskala, "Les Hortensias", 121 bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice

Kontribuaĵoj al IPR

sendendaj en du ekzempleroj, tajpitaj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby (Svedujo).

2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — ILEI 2814 — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)

Kiom da novaj membroj vi varbis?